


Numero: 311.
Aprilo: 2018.

26-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Kuraĝe

Ofte jam esperantistoj entombigas Esperanton dirante, ankoraŭ kelkaj jardekoj kaj la zamenhofa lingvo tute malaperos aŭ restos nur kelkaj, maljunaj fanatikuloj.

Anstataŭ Esperanto tie estas la angla lingvo, kiu perfekte plenumas la rolon de la internacia lingvo. La granda parto de la homaro jam parolas kaj uzas ĉi tiun lingvon.

Vana laboro estas disvastigi artefaritan lingvon.

Aŭdante ĉi tiujn geesperantistojn, mi ege malgajiĝas. Kial ili lernis ĝin, se ankaŭ ili opinias pesimisme pri nia grandioza lingvo.

Fakte la angla lingvo estas disvastiĝinta sur la tuta terglobo. Sed tiu ne signifas, ke ĝi estas la plej bona por tiu ĉi celo.

Mi ne deziras kritiki la anglan lingvon. Laŭ mi ĝi estas grava kaj bela komunikilo. Ĝi havas grandan malutilon. Ĝi ne estas neŭtrala kaj ligiĝas al nacio.

Laŭ mi, internacia lingvo devas esti sendependa kaj neŭtrala, ĉar nur tiel ĝi povas servi malgrandajn naciojn kaj kulturojn. Krome ĝi devas esti facila por ĉiu, kiu decidas ellerni ĝin.

Do ni ne entombigu Esperanton, eĉ klopodu disvastigi ĝin por ke en la sekvaj jardekoj ĝi fariĝu la helplingvo de la homaro.

Mi scias, malfacile kredi, ke Esperanto fariĝos la dua lingvo. Sed imagu, se ankaŭ doktoro Zamenhof rezignus kaj jam en la unua tago estus forĵetinta la ideon krei internacian lingvon, tiam ni nun estus sen la grandioza Esperanto.

Ni estu kuraĝaj kaj neniam ni pensu pri fiasko aŭ malsukceso. Mi certe scias kaj sentas, Esperanto ankoraŭ longe ekzistos, kaj ĝi helpas nian komunikadon, se ni parolas kun diverslingvaj homoj.

Mi tre esperas, la homaro baldaŭe maturiĝos kaj akceptos Esperanton.

— Redaktanto —



Fremdulo

Fremdulo alvenis la urbon. Neniu konis lin. Li surportis longan, nigran mantelon kaj li havis trouzitan ĉapelon.

En la centro de la urbo la loka policisto haltigis kaj petis legitimi lin. La fremdulo aspektis tre stranga. Li ne komprenis la policiston. La viro nur rigardis kaj ne diris eĉ vorton.

— Mi petas vian personan legitimilon — diris denove la policisto. — Rapidu! Mi ne havas tempon tie ĉi staraĉi. Kio estas via nomo?

La fremdulo ne respondis.

— Ĉu vi estas surdmuta aŭ freneza?

Nenia respondo. La fremdulo nur staris senparole. En liaj okuloj ekbrilis mistera lumeto.

La policisto furiozis. Dume tien alvenis ankaŭ aliaj homoj, kiuj interesiĝante rigardis la senpagan scenon. Kelkaj el ili rimarkis:

— Certe li estas eksterlandano.

— Ĉu vi estas eksterlandano? Montru vian pasporton! — diris serioze la policisto. — Ĉu vi parolas nian lingvon?

Li ne ricevis respondon. La fremdulo staris kaj nun jam ridetante rigardis la policiston, kiu ne sciis, kion fari.

Pasis longaj minutoj. Jam ankaŭ la trafiko haltis. Ĉiu rigardis la fremdulon kaj la policiston.

— Ĉu vi ne povas paroli? Se vi ne respondas mi akompanas vin al la policejo.

La fremdulo montris supren per sia fingro. Kvazaŭ per ĝi li dirus:

— Mi venis el la ĉielo.

— Dio mia! — ekkriis la policisto. — Li estas vere idioto. Kion mi faru nun?

— Lasu iri lin plu! — diris iu el la homamaso.

La policisto obeis kaj li montris al la fremdulo, ke li estas libera.

Li denove ekridetis kaj li disetendis sian mantelon. El la trouzita ĉapelo du ruĝaj flamoj eliĝis kaj la fremdulo ekflugis al la ĉielo.

— Ŝaŝa —



Apáti Kovács Béla

Sonĝo

(– Dua parto –)

Fine jam ili preskaŭ kuris. Andreo ŝvitis. Li ne sciis, kien li rapidas. Ankoraŭ li neniam havis tian strangan sonĝon.

Se ĝi estis vere sonĝo. Eble ĝi estas realeco. Li vivas en duobla mondo, kie ankaŭ la sonĝoj reviviĝas.

En la malproksimo vidiĝis granda nigra globo. Ĝi staris meze de la florkampo.

Andreo haltis por momento kaj denove turnis sin al la junulino.

– Ĉu ni iras tien? – li demandis.

La junulino nur kapjesis kaj el ĝi Andreo komprenis, ke la globo estas ilia celo.

Sed kio atendas ilin tie? – tiu ĉi penso traflugis en lia cerbo.



Andreo ĉirkaŭrigardis, la junulino staris fidele malantaŭ li. Ĉie sur la kampo mil kaj mil floroj. Li denove sentis deziron deŝiri unu floreton. Li jam ĝuste kliniĝis al proksima floro, kiam la junulino ekkriis:

– Ne!

Andreo eklevis sian kapon kaj li mire rigardis al ŝi.

– Kial? – li demandis mire. – Kio okazos, se nun mi deŝiras ĉi tiun floreton? Ja, ankaŭ vi estis floro.

Sed la junulino ne respondis. El ŝiaj okuloj elrulis du diamantaj larmogutoj. Tio ĉi tre, tre surprizis Andreon.

– Kial mi ne deŝiru ĝin? – li demandis.

La junulino signis per sia mano, ke Andreo ne faru tion. La averto jam estis malfrue. Li deŝiris la floron kaj en tiu momento la junulino forvaporigis kaj anstataŭ ŝi ekaperis eta, nigra monstro. Ĝi tuj saltis sur la dekstran ŝultron de Andreo kaj kolereme diris:

– Ekde tiu ĉi sekundo vi estas mia servisto. Vi devos obei al mi, se vi ne faros tion, kion mi ordonas al vi, mi punos vin.

Unue Andreo ridis kaj volis forigi la etan, nigran monstron de sur sia ŝultro.

Ĝi forte prenis la ĉemizon per siaj akraj kaj longaj ungegoj.

Vane li provadis deŝiri ĝin de sur sia ŝultro, ne sukcesis. La eta monstro fariĝis tre kolerema.

– Ne faru tion ĉi en la estonto! – ĝi diris furioze. – Nun ek! Antaŭen! Vidu en la foro estas tiu globo. Tien ni iros. Ĝi estas mia kastelo.



Andreo vole nevole devis iri, kiel la eta, nigra monstro ordonis.

Dum la irado ili ambaŭ silentis. Li demendis nenion de ĝi, kvankam li estis tre scivola, kio atendas lin en la globo.

Antaŭ ol ili estus alvenintaj al la globo la monstro ordonis:

– Haltu!

– Ĉu ni alvenis? – demandis Andreo kaj li ĉirkaŭrigardis. – Ankoraŭ ni ne estas ĉe la globo.

– Tio ne interesu vin, kial ni haltis – diris ridaĉe la eta, nigra monstro. – Vi estas mia servisto kaj vi ne havas rajton ion ajn demandi de via sinjora Moŝto. Ĉu vi komprenis?

– Jes – elbuŝigis Andreo kaj li haltis obeeme.

La eta, nigra monstro desaltis de sur lia ŝultro kaj sur la tero ĝi komencis serĉi ion.


Ĝi kuradis de floro al floro kaj ĝi rigardis ĉiun petalon. Andreo interesiĝante rigardis ĝin. Subite ideo traflugis en lia kapo: „Nun estas bonega okazo forkuri kaj liberiĝi de la eta, nigra monstro.”

Sed li timis. La piedoj ne obeis al lia volo. Li restis tie kaj li atendis, kiel fidela hundo.

Ili pasigis tie almenaŭ du – tri minutojn. Vere Andreo ne sentis la pason de la tempo. Ĉiu sekundo por li estis terura. Fine la monstro diris:

– Ni iru al mia kastelo!

– daŭrigota –



Poezio

Ivan Sergeeviĉ Naumov – estas rusia esperantisto.
Naskiĝis en 1971 en Moskvo.

Ivan Naumov

Floreto



Mi kisas la vangon ŝatotan. Interne mi ridas –
Pro kvanto da „o” en novelo de nia renkonto.
Sed subas la ridon tremeto: mi jam ne sinfidas,
Ĉar kreskas la dubo: ĉu *mi* tie restas venkonto?

Ne plue mi certas, ke havas animon el brikoj,
Eternaj por tempo, tro firmaj por rompo kaj krevo...
Jen – brikojn disportas popece hastemaj formikoj
Por kre’ de moskeoj formikaj al Amo kaj Revo.

Mi ĉasis Liberon, mi ŝatis matenan malplenon
De l’ ĉambro, de l’ lito, de l’ mondo – por nova vespero.
Sed nun – ĉu en plena frenez’? – mi serĉadas katenon,
Tra miaj kirasaj ridetoj penetras sincero!..

Mi ŝtone rakontas: „Floreto, mi scias petoli.
Min logas okuloj scipovaj kaj lagi kaj steli.
Karonta, mi devas konfesi: kutima pli-oli,
Mi kvazaŭ junulo – esperis kaj strebos plej-eli...”

Mi skize desegnas la mondon de navo laŭ tajdoj,
De rajdo tra kampoj, enombra amoro sub pinoj.
Kaj vi, grandokula, miranta, tuj preta al rajdoj,
Kapklinas al mi, sur la ŝultron kun kalo pro klinoj.

„Aĥ ne, ne rapidu!.. Alteme: vi konas la kanton?..
Gustumu: ĉi-jara apenaŭ similas realon.”
Kaj mi, menciante trankvilon, senplaŭdon kaj lanton,
Per mano sunbruna plenigas kvarcvitran pokalon.

Ĉu-flustre, ĉu-pense mi gajas pri via destino:
„Pretigu, floreto, mi havos timigan aŭdacon!”
En kvara linio mi rimos vin... Eble, kun vino –
Ĉar ĝuas la lipoj tuŝantaj la ruĝan surfacon.

15.03.92. Vespere



Por infanoj



La vinberokampo de la malriĉulo

(Hungara popolfabelo)

Kaj estis, kaj ne estis, trans fabeloceano vivis malriĉulo. Li havis tri filojn. Ili estis tre malriĉaj. Krom malgranda vinberokampo la malriĉulo posedis nenion. Tage kaj nokte li laboris tie. En ĉiu tago lia alia filo gardis la vinberokampon.

En iu mateno la plej aĝa knabo iris por gardi la terenon. Li sidiĝis kaj li tuj komencis manĝi, kiel li manĝadis tie, neatendite antaŭ li ekaperis rano. Ĝi diris al li:

— Knabo, donu al mi iom da pano! Mi manĝis antaŭlonge kaj mi estas tre malsata.

— Mi donos al vi panon postmorgaŭ, se mi havos bonhumoron — li diris kaj forpelis la ranon.

La rano foriris senvorte kaj la knabo baldaŭ endormiĝis. Vekiĝinte li vidis, ke oni ŝtelis multe da vinberoj. Li tre ektimis, ĉar certe lia patro mallaŭdos lin pro la ŝtelo.

Alitage la meza knabo iris por gardi la vinberojn. La rano petis ankaŭ de li panon. Kompreneble ankaŭ la meza knabo forpelis ĝin, eĉ ĵetis ŝtonon al la malfeliĉa besto.

Poste li kuŝiĝis kaj baldaŭe li endormiĝis. Kiam li vekigis, la knabo vidas, preskaŭ la duono de la vinberoj estas ŝtelitaj.

Hejme lia patro tre koleriĝis kaj li diris al la knaboj:

— For de la domo, maldiligentaj knaboj. Mi ne volas vidi vin.

Fine la plej juna knabo konsolis sian patron:

— Paĉjo mia, ne estu kolerema! La restintajn vinberojn mi gardos.

Li iris al la vinberokampo kaj baldaŭe alvenis la rano kaj ĝi petis iom da pano.

— Volonte mi donas ĝin, raneto — diris la knabo kaj donis panon al ĝi. — Bonan apetiton!

La rano manĝis la panopecetojn kaj dankis:

— Vi estis tre bona al mi. Tial mi donacas al vi kuprovergon, arĝentovergon kaj orovergon. Nokte venos tri ĉevaloj: unu kuproharara, unu arĝentoharara, kaj unu oroharara por renversi la vinberojn. Vi batu aparte ilin per la vergoj! Ili tuj

mildiĝos. Vi ekvidos, tiuj ĉi ĉevaloj servos vin en la estonto.

La knabo faris tiel, kiel la rano proponis.

Noktomeze ekaperis la tri ĉevaloj. Ili laŭte ĉevalblekis, piedbatadis kaj ili komencis renversi la vinberojn. Sed la knabo ne hezitis. Li kaptis la vergojn kaj batis la ĉevalojn. En tiu momento la tri bestoj mildiĝis, kiel ŝafidoj.

— Ne batu nin! — ili petegis. — Se ion vi bezonos, eklevu la vergon kaj ni rapidos al vi.

La ĉevaloj forgalopis kaj la knabo iris hejmen. Sed li diris nenion al siaj patro kaj fratoj. Ili tre miris, ke fine maturiĝis multege da vinberoj, pli multe ol en la tuta vilaĝo. Ili apenaŭ povis rikolti ĝin. Ĉiuj bareloj estis plenaj de vino.

Pasis, pasadis dume la tempo. En iu tago la reĝo starigis altegan kolonon antaŭ la preĝejon kaj metigis sur la supron florbukedon. Li anoncis, kiu povos salti tiel alten per sia ĉevalo, ke li povos depreni la florbukedon, li ricevos la manon de la reĝidino.

Venis reĝidoj, princoj, grafoj, sed neniu sukcesis tiom alten salti per la ĉevalo.

Fine venis kuprokaska junulo kaj li tuj sukcese saltis per sia ĉevalo.

La reĝo miris kaj demandis:

— Kiu vi estas bravulo?

— Mi estas la filo de malriĉulo.

La reĝo ne donis la manon de la reĝidino al li.

— Se ankaŭ morgaŭ vi saltos tom alte, vi ricevos la manon de mia filino.

En la sekva tago venis arĝentokasa junulo kaj deprenis la florbukedon.

Ankaŭ nun dubis la reĝo, ke li estas la filo de malriĉulo. La knabo devis ankaŭ triafoje salti alten por depreni la florbukedon. Sur lia kapo estis orokasko. Nun jam la reĝo ne povis malhelpi la geedziĝon kaj la filo de la malriĉulo edzinigis la reĝidino.

Baldaŭe ankaŭ la du fratoj trovis edzinon por si kaj ili vivis feliĉe ĝis la morto.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

Tradukis: Apáti Kovács Béla



Bildoj

Bildoj

